# EKPAROLIGU!

## ekzercoideoj por paroligi komencantojn
## Temo: familio, prezentoj

### 1. Ĉi vi ŝatas labori?

Instruita materialo: *Demandovorto ĈU?, la verbo ŜATI kaj komune kolektitaj verboj.*

Mi demandas la lernantojn en la nacia lingvo, kion ili ŝatas fari, tiujn verbojn mi skribas sur la tabulon esperante. Ekzemple: manĝi, trinki, dormi, legi, skribi, ripozi, promeni, lerni, labori.
La ekzerco estas tute simpla, en paroj ili devas pridemand-adi unu la alian: *ĈU VI ŜATAS LABORI?*
Ĉu vi ŝatas manĝi? ktp.



### 2. Ĉu vi havas edzinon?

*Instruita materialo:* HAVI kaj la FAMILIO

La anojn de la familio ni kolektas komune en la nacia lingvo, se la grupo ne scivolemas, mi ne instruas la vortojn nevo, nepo, baptopatro, bopatrino, nur se iu demandas. Gravas, ke estu kolektitaj la familianoj, kiujn plejparte ĉiuj havas. Oni povas aldoni ankaŭ kelkajn oftajn dombestojn (hundo, kato, papago).
La tasko estas pridemandi la paron per la demadovorto *"Ĉu"* pri la familio.
Ekzemple: *ĈU VI HAVAS PAPAGON? Ĉu vi havas filinon?*
Oni ĝenerale tre malfacile alkutimiĝas al la akuzativo post la verbo HAVAS, pro tio mi petas ilin, ke la sono N estu kontraŭnature laŭta. La saman ekzercon eblas fari denove dum la sekva leciono, ĝi ne fariĝas enuiga, se oni ŝanĝas la parojn.

### 3. Kiom aĝa estas via filo?

Instruita materialo:
POSEDAJ PRONOMOJ (mia, via ...), NUMERALOJ kaj la demandovorto KIOM?
La tasko estas ekscii la aĝon de la familianoj de la paro

Unue oni uzas la jam lernitajn "Ĉu demandojn": Ĉu vi havas onklon? Poste oni jam povas demandi: *KIOM AĜA ESTAS VIA ONKLO?*
La ekzerco estas pli interesa se la instruisto faras kelkajn kontrolajn demandojn ĉe la fino, kaj instigas la lernantojn noti ĉion, kion ili eksciis pri la alia. Fine de la ekzerco la insruisto montras la lernanton pri kies familio temas, kaj demandas ties partneron. Ĉu vi scias, kiom aĝa estas lia avo? Kiom aĝa estas ŝia edzo?
Por la varieco ni povas instrui ankaŭ la aliajn esprimojn: "Kiom jaraĝa estas via onklo?" Eble ne valoras en tiu etapo enmiksi la esprimon "Kiom da jaroj havas…." ĉar ĉi tie la strukturo estas alia.

### *4. Kio estas la nomo de via patro?*

Instruita materialo:POSESIVA STRUKTURO (la libro de Petro), PROFESIOJ, la demandovorto KIO?

La paroj denove paroladas pri la familio. Ili povas ripeti ĉiujn pli frue lernitajn demandojn. La nova demando estas:
KIO ESTAS LA NOMO DE VIA PATRO? kaj KIO ESTAS LA PROFESIO DE VIA PATRO?
Anstataŭigante la vorton *patro* per aliaj familianoj, la paroj devas ekscii kiel eble plej multe pri la familio de la partnero. Se ili ripetas sufiĉe ofte tiujn demandojn, oni povas esperi, ke la strukturo fariĝos iom post iom aŭtomata.



### *5. Kie vi loĝas?*

Instruita materialo: la prepozicio EN, la sufikso -EJO, la demandovorto KIE?
La demandoj: KIE VI LOĜAS? KIE VI LABORAS? KIE VI LERNAS?

Memkompreneble post la pridemandado de la partnero mem, oni povas fari la samajn demandojn pri ties familianoj.
KIE VIVAS VIA AVINO? KIE LABORAS VIA PATRO? KIE LERNAS VIA FRATINO?

============================================================

### *Kion ni faru post tiu leciono?*

En postaj studhoroj oni povas simple denove ŝanĝi la parojn, kaj lasi, ke ili kombinu la lernitajn demandojn kiel ili volas. Skriba hejmtasko povas esti prezento de la familio, tio ne plu ŝajnos esti malfacila.
La instruisto prezentu sian propran familion per 10-15 frazoj, kaj kontrolu kiom komprenis la lernantoj. Ni povas peti la plej kuraĝajn, ke ili prezentu same parkere sian propran familion per kelkaj frazoj.

### **RESUME**:

La paroligaj taskoj jam de la komenco estas tre utilaj, ĉar:

- eblas tuj ekzercigi la novajn gramatikaĵojn,
- donas sukcesosenton al la lernantoj, ke post kelkhora lernado ili jam povas paroli
- la lernantoj mem demandas novajn vortojn por povi paroli pli multe
- post 4-5 studhoroj ili jam povos prezenti sin kaj la familion
- tiuj demandoj estas la samaj, kiuj en la ĉiutaga vivo estas plejofte uzataj dum interkonatiĝo
- la parolekzerco estas malstreĉiga kaj interesa
- helpas, ke la grupanoj ekkonu pli bone kaj ekŝatu unu la alian

Vi ne devas timi, ke la lernantoj diros stultaĵojn, kaj vi perdos la kontrolon, ĉar komence ili ekzercas ĉiam la samajn gramantikaĵojn ĵus lernitajn. Ili estas kapablaj korekti unu la alian, ja sur la tabulo estas ekzemplo kiel demandi, kaj estas ankaŭ ekzemplo kiel respondi la demandon. Dum tiaj ekzercoj tuj evidentiĝas se iu ion ne komprenis, la instruisto promenu inter la seĝoj, por iom subaŭskulti, kaj por helpi se estas problemo.
Ne gravas se foj-foje ili eraras, estas multe pli grave, ke ili havu la kuraĝon ekparoli.
Tiuspeca ripetado de la sama strukturo ne fariĝas enuiga, ĉar ili vere deziras ekkoni unu la alian.
Se hazarde la nombro de lernantoj estas senpara, la instruisto nepre ne fariĝu partnero de iu. Tiukaze estu tri homoj, kiuj paroladas kune, la tasko de la instruisto estas respondi la eventualajn demandojn, kaj subaŭskulti iom ĉiun paron.